

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazos

Hama-Ronda Tago + Aprecado de Sakuroj

En la 31a de marto (dim) 15:00-, okazos en la Muzeo, Hama-Ronda Tago kun la temo “Serio Oriento-Okcidento”, la literatura libroserio.

Poste, volontuloj kune vizitos piede la bordon de Rivero Oooka, kie floras sakuroj, kaj kie pendos i.a. 10 pendlanternoj kun nia nomo.

EL NIA MUZEO

VIZITIS NIN NEESPERANTISTOJ

• En la 27a de dec. 2023, duafoje vizitis nin mastro de ĉina restoracio Koozyu situanta en nia ĉirkaŭo. Li simpatias al nia afero, kaj donis konsilon pri informaj aferoj.

• En la 9a kaj 12a de jan. 2024, vizitis najbaro (laŭ rekta mezuro, sed ĉirkaŭiro bezonata por sekure transigi fervojon), kiu ekkonis nin per nia ŝildo sur muro. Li donacis al ni gazetartikolon verkitan antaŭ 48 jaroj, pri slangoj en Esperanto, aperinta kiel unu el la serioĵoj en gazeto pri slangoj diverslandaj*. La verko de Huĝimoto Tacuo jam estas raraĵo inter ni. Dankon!

* いうたらあかんディクショナリ、『面白半分』1976-12

el Ĉeĥio

Karaj redaktoroj de Novaĵoj tamtamas,

Unue mi volas esprimi mian dankon por la regula sendado de via interesa gazeto kun tiel longa historio.

Nun mi reagas al por mi surpriza artikolo (preskaŭ recenzo) de Arne de la aŭtoro Leif Nordenstorm el la plumo de Sibayama Zyun'iti. Mi nur volas sciigi al vi, ke vi legis certe malnovan etforman eldonon kun nigroblankaj ilustraĵoj, kiu tamen estis tre sukcesa, eĉ al ĝi estis aljuĝita dum la UK en Florenco la premio “Infanlibro de la jaro”. Momente ekzistas jam la tria eldono, pli granda, solide bindita, kun koloraj ilustraĵoj, kiel vi povas vidi ĉi tie (<https://www.kava-pech.cz/#/eo/b/XMnjEBAAACIAK7j4/autor-leif-nordenstern11>).

Danke kaj amike vin salutas via ĉeĥa amiko

Petr Chrdle

el Aŭstralio

Kara,

Mi tutkore dankas vin pro la sendo de Novaĵoj Tamtamas.

Feliĉan kaj fruktodonan jaron al ĉiuj membroj de la Jokohama rondo

Franciska Toubale



Japanaj Festotagoj (1)

Akiya Hideo

Naciaj festotagoj de Japanio estas difinitaj en “la leĝo pri naciaj festotagoj” (1948-). La leĝo diras, “Japanoj, senĉese dezirantaj liberecon kaj pacon, klopodas por kreskigi sian belan moron kaj konstrui pli bonan socion, pli prosperan vivon. Por tio japanoj fondas la naciajn festotagojn kaj ilin ĉiuj kune festas, dankas kaj memoras.”

Ĉi-jare en 2024 troviĝas 16 festotagoj.

1. Novjara Tago, la 1-a de januaro

“Ni japanoj festas la komencon de la jaro.” Ni kutime ferias la unuajn 3 tagojn de la novjaro, ne nur la unuan tagon, kaj krome la finajn 2, 3 tagojn de la pasintjaro por prepari por la venonta novjaro, entute almenaŭ 5, 6 tagojn kiel la jarfinaj-novjaraj ferioj. Tamen tre bedaŭrinde, en la novjara tago ĉi-jare granda tertremo kaj cunamo okazis kaj severe damaĝis urbojn de Noto-duoninsulo, Hokuriku-regiono. Ekde nun ĉi tiu tago eble estos la tago ankaŭ por rememori la viktimojn de la katastrofo.

2. Festo de Maturiĝo, la 8-a (la dua lundo) de januaro

“Ni gratulas kaj kuraĝigas la junulojn, kiuj konscias sian maturiĝon kaj volas mem starigi sian propran vivon.” Antaŭe la tago estis fiksita en la 15-a de januaro, sed iam ŝanĝita al la dua lundo, eble ĉar sinsekvaj ferioj de la semajnfino estas oportunaj por la novaj plenkreskuloj ĉeesti la ceremonion de maturiĝo ĉe ilia hejmloko. Foje la adoltiĝa aĝo estis 20, sed ekde 2022 ĝi estas 18 laŭ la ŝanĝo de la civila juro. Tio celas akceli la partoprenon de pli junaj homoj en naciaj aferoj, kaj egaligi la aĝon de plenkreskiĝo al aĝo ĝenerala en la mondo. Malgraŭ tio, multe da lokaj administracioj ankoraŭ nun celebras la novajn 20-jaraĝulojn en la ceremonio.

3. La Fondotago de Ŝtato, la 11-a de februaro

La tago por “memori la fondon de Japanio kaj nutri amon de homoj al la lando.” Sed tio nur baziĝis sur la mito, en kiu ĉi tiun tagon antaŭ 2 684 jaroj la unua reĝo *Jinmu*(-tennoo) surtroniĝis ĉe la palaco Iware, Nara-gubernio.

Kompreneble, tio ne eblas kiel historia fakto kaj estas tute malracia, ĉar multe da mitaj reĝoj vivis tre longe, pli ol 100 jaroj. Tiu ĉi tago estis enprenita en la leĝo en 1966. Tiam estis multe da diskutoj kaj disputoj: “La dato ne taŭgas, ĉar ties bazo estas ne reala,” aŭ “Tio montras la intencon de konservativuloj revigi la tennoan reĝimon same kiel en la antaŭmilita tempo.” Eble pro tio, la leĝo difinas nur ties signifon, sed ne apartan daton. La daton determinas la kabineto per sia dekreto.

4. La Naskiĝtago de Tennoo, la 23-a de februaro

La nuna tennoo *Naruhito* naskiĝis ĉi-tage en la jaro 1960, kaj heredis la tronon en 2019.

5. Printempa Ekvinoksa Tago, la 20-a de marto

La festo por “admiri la naturon, ami vivaĵojn.” La dato estas determinata kiel la astronomia ekvinokso, kaj nature varias ĉiujare. Oni espere diras ke vintra malvarmo daŭras nur ĝis ĉi tiu ekvinoksa budhoserva semajno. La festo originis el la printempa kortega evento “*Ŝunki Kōrei-sai*” (la printempa festo por tennoaj prapatroj).

6. La Tago de *Ŝouwa*, la 29-a de aprilo

“Ni retrorigardas la tempon de *Ŝouwa*, tra kiu la nacio releviĝis el la ruinoj post sia granda suferado, kaj pentras estontecon de la nacio.” Tamen, tio ŝajnas al mi ia preteksto. Ĝi origine estis la naskiĝtago de *Ŝouwa*-tennoo (1901-1989). Ĉar la tago jam estis establita kiel popola libertago, post kiu sekvas la granda feria semajno de majo, kiu estas tre konvena por turismi, oni certe bedaŭris forigi tiun ferion, kaj kreis novan signifon, mi kredas.

7. La Tago de Konstitucio, la 3-a de majo

“Ni memoras la aplikadon de la Konstitucio de Japanio, kaj esperas kreskadon de la nacio.” Laŭ mi tiu festotago estas la plej grava en la jaro, sed ĝi estas iom nerimarkebla, ĉar ĝi situas interne de la granda feria semajno de la monato.

(daŭrigota)

Prelego

(Redaktora komento) Ni en pluraj numeroj aperigos paroltekston de s-ro Doi Hirokaz, kiam li rete parolis pri nia Muzeo, okaze de la 105a AMO-Seminario, en la 13a de novembro 2023.

Esperanto-Muzeo Jokohama (1)

Doi Hirokaz

Muzeo por ĉiu, kiu ne scias Esperanton

Saluton al ĉiuj!

Mi prezentos al vi pri “Esperanto-Muzeo Jokohama”.

Subtitole, “Muzeo por ĉiu, kiu ne scias Esperanton”

Unue mi atentigas vin, ke mi prezentos ne bibliotekon, sed muzeon. Nia biblioteko estas unu parto de la muzeo.

La posedanto de la muzeo estas NeProfitcela Organizo Esperanto Jokohama.

En la komenco mi parolos pri mia vidpunkto pri nuna stato de ĝenerala rekono pri Esperanto en Japanio.

Nuna stato de rekono pri Esperanto en Japanio

Kiam oni temas pri la ĉina, la franca aŭ la hispana lingvoj, multaj facile komprenas, pri kio ni temas.

La ĉina lingvo estas uzata en Ĉinio, la franca estas parolata en Francio aŭ la hispana estas uzata en Hispanio, kaj ankaŭ multaj scias, ke la hispana lingvo estas vaste parolata tra mez- kaj sudameriko. Oni facile komprenas la lingvon imagante lokon en kiu la lingvo estas uzata.

Sed, vi starigas demandon al iu, kio estas Esperanto, vi devas unue klarigi, ke Esperanto estas lingvo. Multaj aŭ ne multaj scias ke Esperanto estas lingvo, kiun tiu iam aŭdis. Sed eĉ malmultaj ne scias, kie la lingvo estas uzata. Oni ne povas facile supozi, ke la lingvo rilatas al neniun konkretan landon aŭ regionon.

Kiam vi renkontos homon, kiu havas pli da scioj pri Esperanto, en la okazo de Japanio, la reago ŝajnas, ke ĝi floris en la pasinteco, kaj malaperis post tiam. Tiamaniere Esperanto estas agnoskita kiel “nevideblaj estaĵoj”. Estas malfacile imagi la ekziston de Esperanto, la lingvo sen lando aŭ sen regiono.

Esperanto estas lingvo; do se iu aŭdas la sonon, tiu povas almenaŭ reale imagi ĝian ekziston. Ankaŭ se iu rigardas librojn aŭ revuojn de Esperanto, tiu povas rekoni ĝin kiel

lingvon. Feliĉe, nuntempe jutubo prezentas pri aŭ en Esperanto sennombrajn fojojn. Do ekzisto de Esperanto estas konata. Tamen, ankoraŭ nun ni renkontas simplajn demandojn “Ĉu ekzistas literoJ?“, “Ĉu ĝi havas vortaron?”

Forigi la mankon de agnosko

Al tiuj, kiuj ne tre konas Esperanton, aŭ al tiuj, kiuj havas nur nebulan scion pri Esperanto, ni deziras montri ĝian disvastiĝon en Japanio kaj en la mondo, de infanoj al plenkreskuloj. Kaj ni ankaŭ deziras rompi ilian mallarĝan aŭ necertan vidon pri Esperanto. Unu el la rimedoj solvi la problemon estas fondo de Esperanto-Muzeo.

Nia muzeo estas malfermata al ĉiuj ne-esperantistoj. Ĉiuj povas viziti senpage. Oni povas trovi en la muzeo, klarigajn panelojn pri Esperanto-strukturo kaj pri scenoj reale uzitaj en diversaj Esperanto-kongresoj.

La plej gravaj montroj de ĉi tiu muzeo povas esti libroj kaj periodaĵoj, kiuj vere montras ekziston de Esperanto. Ŝancoj vidi la realajn gazetojn kaj librojn estas maloftaj. Sed tie ĉi oni povas vidi ilin rekte kaj abunde.

Vizitante la muzeon de Svitavy en Ĉeĥio

En 2016, mi vizitis la oficejon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Svitavy. Okaze de la 101-a Universala Kongreso en Nitra, Slovakio, kiel la antaŭkongresa ekskurso mi vizitis ĝin. Kunvenejo kaj ekspoziciejo estas relative modesta. En la





halo estas vicigitaj ĉirkaŭ 20 seĝoj. La halo servas al malgranda renkontiĝo. Ĝin ĉirkaŭas ekspoziciaĵoj montritaj en vitraj kestoj. Ankaŭ paneloj troviĝis.

Mi ricevis sugeston, kio estas muzeo. Ĝis nun ni deziris havi propran oficejon de la asocio. Se ni povos havi oficejon, ni ankaŭ utiligos ĝin kiel muzeon por urbanoj, kiuj ne scias ekziston de Esperanto.

Neatendita donaco de granda sumo

Kiam mi vizitis Esperanto-Muzeon en Vieno por postkongresa ekskurso en la sama kongreso, Doi Ĉieko ricevis proponon de iu familio. Tio temis pri mondonaco al Esperanto-grupo en Jokohamo. Ili lasis ŝin pensi uzmanieron de la donaco.

La plano starigi Esperanto-muzeon kiel en Svitavy venis al nia kapo. Ni planis krudan bildon pri Esperanto-muzeo en la urbo Jokohamo. Se la plano realiĝos, ĝi multe kontribuos al Esperantomovado en Jokohamo. Ĝin ni prezentis al la mondonaconto. Ili aprobis nian planon.

En 2021, kun aliaj membroj de la jokohama grupo ni serĉadis taŭgan lokon por la muzeo. Ĝi devas situi proksime de fervojstacio. La nuna muzeo tute hazarde troviĝis. Iun tagon reklamo de nemoveblaĵa agento kaptis niajn okulojn. Tuj ni petis la agentejon gvidi nin al la domo. Ĝi staris je malpli ol 10 minutoj piede de la stacio. Ni ŝatis la fakton, ke ĝia planko estas ligna, ne tatama krom unu ĉambro japanstila. Fenestroj estas larĝe malfermitaj, do interno de la domo estas tute hela. La domo staris tuj apud fervojo. Ni zorgis pri la bruoj, sed dum la trarigardado en la domo ĝi tute ne ĝenis nin; ni eĉ ne rimarkis ĝin. Ni povus aĉeti la konstruaĵon kun tereno per la donacota monsumo. La kialo de la malalta prezo ŝuldiĝus al tio, ke la loko estas tujflanke de fervojaj reloj, kaj la kondukanta vojo al la domo estas mallarĝa kaj pro tio aŭtoj ne povas turni sin antaŭ la domo. Kaj ke ĝia kosto estas preskaŭ egala al la terprezo pro paso de 27 jaroj post konstruo.

Ni sciigis pri la domo al la direktoroj kaj aliaj gravaj membroj de la asocio. La sekvan tagon ili vizitis ĝin kaj ĉiuj taksis ĝin taŭga. Ni okazigis provizoran ĝeneralan kunsidon kaj decidis aĉeti ĝin.

Tiel, en decembro 2020, la asocio akiris la terenon kun konstruaĵo. Post la posedo, la japanstila ĉambro estis aliformigita, kaj la 23an de aprilo 2021 memorfestante la 6-an datrevenon de la nova fondiĝo de NeProfitcela Organizo Jokohama, malfermiĝis “Esperanto-Muzeo Jokohama” kun la celo konigi al urbanoj Esperanton.

(daŭrigota)

sezonvorto februara

Ehomaki

Okita Kazumi

Estas rulsuŝio manĝata en la nokto de *secubuno* (la tago de ŝanĝiĝo de sezonoj, vintra kaj printempa). Onidire oni povas kontentigi sian deziron se oni finmanĝus ĝin senvorte turnante sin al la bonaŭgura direkto kie onidire ekzistas *Toshitoku-jin*, nome dio, kiu respondecas pri feliĉo en tiu jaro.

Bonaŭgura direkto en 2024 estas oriento-nordo-oriento.



ehomaki (rulsuŝio)